**PILO-PRESS**

Internacia Informservo

N-ro 8/1976 - 19 feb 1976
Aperas ĉiusemajne

Semajno de Internacia Amikeco 1976

Atentu la specialan eldonon de PP

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Pri Eŭropa Esperanto Kongreso

Eindhoven (pp) - La LKK de Eŭropa Esperanto-Kongreso informas:

S-ro Jo Haazen, urba kariljonisto de Antverpeno, faros en la kadro de la Eŭropa Esperanto Kongreso en Eindhoven, koncerton je la kariljono de Evoluon, la futurista scienc-teknika ekspoziciejo de Philips-uzinoj. La kariljona koncerto okazos lundon la 19-an de aprilo, de 12,oo ĝis 13,oo horo.

En Evoluon estos havebla speciala permagnetofona rondgvidado, t.n. gvidofono, nun ankaŭ kun tekstoj en Esperanto. La rondgvidado konsistas el tri bendoj, kiuj sinsekve estas haveblaj ĉe la informejo.

Dum la Eŭropa Esperanto Kongreso prelegos ankaŭ la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin. La temo de la prelego estas: "Niaj plej gravaj taskoj en UEA".

Dum la Interkona Vespero kantos "Strijps Meisjekoor" (Knabina ĥoro de la Eindhovena kvartalo "Strijp"). La knabinoj ne estas esperantistinoj, sed ili jam kantis en Esperanto dum la Trilanda Renkontiĝo en Eindhoven en 1973.

## 61-a Universala Kongreso en Ateno

Rotterdam (pp)-El la Oficiala Komuniko, N-ro 4, ni citas:

Krom ĉiuj jam anoncitaj ĉefaj kunsidoj, tradiciaj aranĝoj kaj fakaj kunvenoj, en la kadro de la Atena UK okazos ankaŭ: kunveno pri disvastigo de Esperanto en Afriko, Azio kaj Latinameriko; kunvenoj de la Akademio de Esperanto, medicinistoj, rotarianoj, ŝakludantoj, Eŭropa Klubo, matematikistoj kaj militrezidtantoj.

## Paciencon por la Dua Bulteno

Pro diversaj prokrastoj, la Dua Oficiala Bulteno aperos nur en marto, anstataŭ en februaro, kiel ni pli frue anoncis. Ĝi enhavos la necesajn detalojn kaj mendilojn pri loĝado, ekskursoj k.s. Ni afable petas la kongresanojn ne skribi al la kongresaj adresoj individue pri siaj loĝaj aŭ ekskursaj deziroj, antaŭ ol ricevi la Duan Bultenon.

## Ateno lumos por la kongresanoj

La urbo Ateno estos speciale lumigita nokte okaze de la 61-a UK. Tiel promesis la urbestro de Ateno, s-ro Johano Papatheodoru.

Aliĝoj: Ĝis la 2-a de februaro 1976 aliĝis 577 kongresanoj el 44 landoj. Inter ili estas el FR Germanio 33 kaj el Greklando 22.

## SAT-Kongreso en Gotenburgo

Gotenburgo (pp) - Kiel ni jam informis, la 49-a Kongreso de SAT okazos de la 24-a ĝis la 30-a de julio 1976 en la konata sveda martrafika urbo Gotenburgo. La sveda ĉefministro, Olof Palme, sendis al la redakcio de la organo de Sveda Laborista Esperanto Asocio, kuraĝigan leteron, en kiu li deziras sukceson okaze de la SAT-kongreso, substrekante ĝian signifon kontribui al pli intensaj rilatoj en la internacia laborista movado.

ROBERT STOLZ
HIMMELSTRASSE 69 · A-1190 WIEN
TEL. 32 14 25

Frau
Charlotte Hube
p.Adr.
Esperanto - Redaktion
O R F
Postfach 700
1041 W I E N

Wien, am 7.Januar 1976

Sehr verehrte gnädige Frau !

Von begeisterten Hörern der Esperanto - Sendungen des ORF habe ich die Tonbandaufnahme des Robert Stolz - Sonderprogrammes erhalten.Kurioser weise wurde dies Sendung in Berlin auf Band aufgenommen.

Ich danke Ihnen, sehr verehrte gnädige Frau, daß Sie so liebenswürdig waren, mit Ihrer zauberhaften Stimme das Lied "IM PRATER BLÜHN WIEDER DIE BÄUME" in Esperanto zu interpretieren. Sie haben dieses Lied meines Mannes großartig, mit sehr viel Herz und Einfühlungsvermögen gesungen.

Durch atmosphärisches Rauschen am Band konnte ich leider nicht verstehen, wer der Pianist bei diesem Vortrag war, doch bitte ich Sie,dem Maestro für seinen excellenten, werkgetreuen Vortrag meinen herzlichsten Dank zu übermitteln.

Auch mein Mann war der Meinung, daß die weltumspannende Esperanto - Idee zur Völkerverständigung viel Beitragen kann, da sie alle Barrieren überwindet.

Mit meinen besten Grüßen und allen guten Wünschen für ein glückliches, erfolgreiches Neues Jahr, Ihnen und allen Mitarbeitern des Esperanto -Programmes, verbleibe ich

allerherzlichst Ihre

Einzi Stolz

Einzi Stolz

Nova letero de Einzi Stolz

Vieno (pp) - Einzi Stolz, la vidvino de la konata aŭstra komponisto Robert Stolz, ankaŭ skribis leteron al s-ino Charlotte Hube, kiu pasintjare kantis la Stolz-kanton "En Prater refloras la arboj" en Esperanto en la Aŭstra Televido kaj en la Esperanto-elsendoj de ORF. En tiu letero s-ino Stolz dankis al s-ino Hube pro la bonega interpreto de tiu kanto en Esperanto. (Vidu la supre publikigitan leterkopion!). En tiu letero s-ino Stolz ankaŭ skribas:

"Ankaŭ mia edzo opiniis, ke la mondonĉirkaŭprenanta Esperanto-ideo povas kontribui multon al popolinterkompreniĝo, ĉar ĝi venkas ĉiujn barojn."

********

Esperanto en Televido

Bratislavo (pp) - La 15-an de oktobro 1975 komenciĝis en Bratislavo televida kurso de Esperanto. La elsendo, kiu okazas regule ĉiun merkredon en la vesperaj horoj, estas videbla nur en Slovakio.

## Esperanto en Radio

### La semajna komentario de d-ro Alfred Macher, Radio Vieno

La 14-an kaj 15-an de februaro la Esperanto-Redakcio de Radio Vieno disaŭdigis jenan semajnan komentarion:

"La Vintra Olimpiado en Innsbruck finiĝas. Multaj homoj el eksterlando vidis propraokule, al kiaj grandfaroj la relative malgranda Aŭstrio kapablas - malpli en sporto mem ol en la gigantecaj preparoj, por tia aranĝo necesaj.

Ĉu la Olimpiado kaj ĝiaj grandegaj kostoj penvaloris? Internaciaj renkontiĝoj ĉiam pen- kaj kostvaloras! Krome: en Tirolo, speciale en Innsbruck, estiĝis konstruaĵoj, kiuj sub ordinaraj kondiĉoj estus restintaj, por longa tempo ankoraŭ, nuraj revaĵoj.

Nepravigeblan foruzon de publika mono oni riproĉas ankaŭ al la estroj de la kvar ŝtataj teatroj en Vieno. Certe, operọ, kiu estas unu el la plej bonaj kaj renomaj en la tuta mondo, kaj teatroj, kiuj volas resti fame konataj, n e povas vivteni sin mem en la nuna epoko, kaj niaj ŝtatteatraj direkcioj neniam estis ĝuste ŝparemaj. Sed tio, kion la financkontrolo ĵus malkovris kaj publikigis, indignigas ĉiuflanke. Montras sin mirigite indignaj ankaŭ la kritikataj malŝparuloj - ilia sinteno estis ja, kiel ili asertas, la plej bona.

Ĉiukaze la parlamento okupiĝos pri ilia deficito; ankaŭ la registaro anoncis sian intervenon. Malfacilaj taskoj, ĉar en la teatroj kaj en la opero la aferoj estas terure interplektitaj.

Jen nia konsolo: vintraj ludoj kaj ŝtataj teatroj sendube kostas multege, sed ili altigas nian prestiĝon!

Aŭ ĉu tiu vidpunkto estas tro subjektiva? "

### Dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra

D-ro Antonio De Salvo raportis kadre de Esperanto-Kuriero de Radio Roma:

"Ni jam plurfoje raportis, ke Vatikana Radio principe akceptis elsendi ankaŭ en Esperanto, sed ĝi ankoraŭ ne decidis tagojn, horojn, amplekson de tiaj elsendoj. Laste, ĝi sciigis en letero, ke ne temos pri vera "rubriko", sed pri laŭokazaj, sporadaj anoncoj en Esperanto, kaj ke tio okazos "dum estonteco".

Nun ni havas submane leteron, senditan la 10-an de januaro de la Vatikana Ŝtata Sekretariejo, responde al peticio de polaj katolikoj favore al la enkonduko de Esperanto en la vatikanajn programojn. Ĝia traduko tekstas jene: 'La afero estis plurfoje ekzamenita de la estroj de Vatikana Radio, sed, kiel oni ankaŭ sciigis antaŭ nelonge al la Prezidanto de la Internacia Asocio de Esperantistoj Katolikaj, teknikaj kaŭzoj malhelpas la realigon de regula programo en Esperanto, kaj la uzadon de ĉi tiu lingvo en pli ampleksa formo ol nun, kiam oni uzas ĝin en kelkaj mallongaj eroj kaj anoncoj'.

Tio signifas, ke laŭ la Ŝtata Sekretariejo Esperanto estas uzata jam nun, dum Vatikana Radio diras, ke ĝi estos uzata dum estonteco. Tipa ekzemplo de dekstra mano, kiu ne scias, kion faras tiu maldekstra! Por ke la principa decido elsendi en Esperanto fariĝu reala fakto, estas necese, ke amaso da esperantistoj petu detalojn pri la planata elsendo, aldonante, ke jam de pluraj semajnoj ili regule aŭskultas Vatikanan Radion kun la espero ekaŭdi la internacian lingvon, sed vane.

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur daŭrigis sian interesan serion pri la reto-romanĉa lingvo, kaj ge-sroj Gacond denove trafoliumis malnovajn kajerojn de Literatura Mondo!

Esperanto en Radio

Varsovio. Se oni volas adekvate prijuĝi kaj apreci la Esperanto-elsendojn el Varsovio oni nepre devas paroli pri la kulturaj, politikaj kaj ekonomiaj programoj, kiuj ja estas esencaj partoj de tiu elsendoj. Kaj ĝuste tiaj programoj, speciale la ĉiutagaj radiaj ĵurnaloj, elstarigas tiujn Varsoviajn elsendojn kaj donas al ili saman rangon kiel al alilingvaj elsendoj. Speciale aktualaj estis lasttempe - ankaŭ en la Varsoviaj elsendoj - la problemo pri Angolo, la situacio en la Eŭropa Ekonomia Komuno kaj la rilatoj inter Pollando kaj FR Germanio. Ni ne povas ĉi tie valorigi la enhavon de la komentarioj - tion devas fari ĉiu aŭskultanto mem!

Sed ankaŭ la pri-Esperantaj temoj valorus pli vastan traktadon, ekzemple la intervjuo kun finna aŭskultanto pri Esperanto-informado kadre de la Esperanto-Ekspreso aŭ la rilatoj inter Pola Esperanto-Asocio kaj Centra Laborrondo Esperanto en GDR, prezentitaj de Jan Klîmek en la semajna rubriko "El la vivo de PEA". Sed mankanta loko tio malhelpas!

Mi nur volas ankoraŭ mencii, ke en la pasinta semajno alvenis en la Esperanto-redakcio de Varsovio 95 korespondaĵoj.

**********************

Esperanto-Informo el Aŭstralia Ambasado

Bonn (pp) - La Unua Sekretario de la Ambasaso de Australio en Bonn, S-ro Peter F. Davison, sendis al ni anglalingvan raporton kun foto pri la Unua Pacifika Esperanto-Kongreso, kiu okazis de la 2-a ĝis la 10-a de januaro en Melburno, Aŭstralio.

El la raporto ni eksciis, ke partoprenis pli ol 200 esperantistoj el 10 landoj, inter ili Aŭstralio, Novzelando, Japanio, Usono kaj Papua Novguineo. Dum la kongreso oni decidis, ke pacifika Esperanto-kongreso okazu ĉiun kvaran jaron. La venonta kongreso do estos 1980, verŝajne en Japanio.

En la kongreso cetere ankaŭ partoprenis Emil Vokal, Esperanto-parolisto de Radio Vieno.

Jarĉefkunveno en Hamburgo

Hamburgo-(pp/hŝ) - La 12-an de februaro okazis la jarĉefkunveno de Hamburga Esperanto-Societo, kiu estis elstara laŭ diversaj vidpunktoj.

La membraro ne nur aprezis la valoran laboron de la societo dum la jaro 1975, sed alelektis al la estraro kelkajn kompetentulojn, kiuj faru la klubvivon eĉ pli sukcesa.

La nova estraranino pri kulturaj programoj, s-ino Luisa Hoffmann, zorgos, ke la kluba vivo estos ankoraŭ pli alloga. S-ro Johann Eitmann prizorgos la societan bibliotekon, kaj Harald Schicke flegos la publikajn rilatojn. La fako por publikaj rilatoj ricevis la plej grandan buĝeton, nome 1 500 GM.

Precipe ĝojiga estis krome la fakto, ke la estraro tre juniĝis. Peter Weide fariĝis sekretario kaj Thomas Bormann estonte prizorgos la eldonadon de la Hamburga Informilo.

SEL-jubileo

Saarbrücken (pp) - Sarlanda Esperanto-Ligo ekzistas 25 jarojn, la 18-an de februaro 1976. Memore al tiu datreveno la ligo kunvenos la 6-an kaj 7-an de marto en la junulargastejo Homburg-Sanddorf.